Nordgermana Heroldo

№ 1 – Aprilo 2018

Enhavo

Ĉeftemo 3
La Dunning-Kruger-efiko 3
Tutmonde 6
Nombro de murdoj kreskas en London 6
Amazon maldungas laboristojn 7
El la movado 9
Invito al Frankfurt (Oder) 9
Vagas fantomoj 10
Norddeutscher Bote 13
Esperanto-Treffen in Schleswig-Holstein 13
Von Schwerin an die Côte d'Azur 14
Felietono 16
Forgesitaj libroj 16
Lingva noto 19
Leterkesto 21
El la redakcio 22
La lasta paĝo 24

Ĉeftemo

La Dunning-Kruger-efiko

Oni nomas Dunning-Kruger-efikon la tendencon de nekompententaj homoj, ke ili supertaksas la proprajn konojn kaj subtaksas la kompetenton de aliaj personoj. La nocio devenas de publikaĵo de David Dunning kaj Justin Kruger el 1999 kaj priskribas miskognon.

Dunning skribis: *Estante nekompetenta, iu ne povas scii, ke li estas nekompetenta. … La scipovojn, kiujn oni bezonas por trovi ĝustan solvon, estas ĝuste tiuj scipovoj, kiujn oni bezonas por ekkoni solvon kiel ĝustan.*

En antaŭaj studaĵoj Dunning kaj Kruger rimarkis, ke dum komprenado de tekstoj, ŝakludado kaj stirado de aŭto nescio anstataŭ scio ofte kaŭzas memfidon. Ili plu esploris la efikon per pliaj eksperimentoj kaj en 1999 konstatis, ke nekompetentuloj

- emas supertaksi la proprajn scipovojn
- ne ekkonas superecajn scipovojn de aliaj personoj
- ne ekkonas la amplekson de la propra nekompetento
- povas plikompetentigi sin per ekzercado kaj pliklerîĝado kaj tiam lernas pli bone taksi la proprajn scipvojn kaj tiujn de aliaj.

Dunning kaj Kruger montris, ke malfortaj laborrezultoj kaŭzas pli grandan memsupertakson ol fortaj rezultoj faras tion. Tamen alta memtakso ne signifas malfortajn laborrezultojn.

Ili ankaŭ konstatis, ke personoj kun altaj scipovoj emas subtaksi sian kompetenton kaj erare kredas, ke taskoj, kiuj estas facilaj por ili, estas same facilaj por aliaj.

Studaĵoj kun orient-aziaj personoj sugestas, ke diversaj kultur-dependaj sociaj fortoj influas la kognon. Orient-azianoj emas subtaksi siajn scipovojn kaj komprenas malfortajn laborrezultojn kiel instigon por plibonigi sin kaj egaliĝi al la aliaj kunlaborantoj.

Kogno

La Dunning-Kruger-efiko priskribas misan kognon, sed kio estas *kogno*?

Kogno (germane: Kognition, angle: cognition, ruse: познание) ne estas precize difinita procezo de ekkonado, prilaborado kaj transformado de informoj en sistemoj, kiu kondukas konduton. La kognado de homo okazas en la menso, ekzemple:

- perceptado kaj atentado
- enmemorigo kaj lernado
- solvo de problemoj, kreivo, imagivo
- argumentado
- memobservado

- volo
- kredo

Tutmonde

Nombro de murdoj kreskas en London

En aprilo eliris informo, ke London, ĉefurbo de Granda Britio, superis New York-on en la nombro de murdoj en februaro kaj marto de 2018. Entute estis 46 mortigoj en la brita ĉefurbo kompare al 50 en New York.

Sed, dum la nombroj de mortigoj de New York malpliiĝis en la fino de januaro, la nombro de London signife kreskis ekde tiu punkto.

Statistikoj de New York Police Department (New-York-a polica taĉmento, NYPD) kaj la brita Ĉefurba Polico, raportitaj en *Sunday Times* kaj akiritaj fare de *BBC*, montras proksimiĝantajn kvotojn de murdoj inter la du urboj, kiuj havas similan grandecon laŭ loĝantoj.

La ĉefurba polico diris, ke ĝi »maltrankviliĝis pro la kresko de murdoj en Londono«. La London-a magistrato diras, ke ĝi estas »profunde tuŝita« pro pertranĉilaj atakoj en la ĉefurbo, sed insistas, ke London »restas unu el la plej sekuraj urboj de la mondo«.

En januaro, la London-a polico esploris ok murdojn, NYPD 18 mortigojn. En februaro, la nombroj de NYPD falis al 11, ĝi kreskis en Londono ĝis 15. En marto, 22 murdoj estis investigaciataj en Londono, kaj 21 en New York.

»Unu murdo estas tro multa, kaj ni forte laboras kun niaj partneroj por kompreni la kreskadon, kaj kion ni povas fari por malhelpi tiujn tragediojn jam de la komenco«, diris parolisto de la polico.

Amazon maldungas laboristojn

***Amazon* malgrandigas siajn eldon-helpajn servoj kadre de Createspace en North Charleston, Usono.**

La firmao *Amazon* estas konata pro sia aktiva laborado por memstaraj verkistoj kaj aŭtoroj, kiuj publikigas siajn verkojn sendepende de eldonejoj. Krom elektronikaj libroj (e-libroj) ĝi ofertas ankaŭ presadon de libroj. En pasinteco tiu taĉmento estis *Createspace*, aktuale oni transmetas iom-post-iome la presadon al *KDP* (Kindle Direkt Publishing, Kindla rekta publikigado). Tiel la elektronika kaj la tradicia eldonado kunfandiĝas. Oni supozas, ke ekzistos ununura platformo, nome KDP. Jam nun KDP ofertas aŭtomatan konvertadon de e-libroj al presitaj libroj kaj komunan vendadon.

Nun Amazono diras, ke ĝi neniigas parton de sia oficejo en North Charleston ĉi-somere, unu jaron, post kiam la firmao jam formovis sian libro-presan fabrikon. Ĝi maldungos 58 laboristojn.

North Charleston estas urbo kun 98 000 loĝantoj proksime de Charleston en la distriktoj Charleston County

kaj Dorchester County en la usona partoŝtato Suda Karolinio (South Carolina).

La maldungado komenciĝos en marto, kaj la taĉmento fermiĝos en julio laŭ letero la kompanio sendita al la ŝtata taĉmento pri dungado kaj laboristoj.

»Post trarigardo de la servoj, kiun ni ofertas, ni decidis ĉesigi la pagendajn eldonojn, libro-aranĝajn laborojn kaj merkatajn servojn de Createspace«, Amazon diris en komunikaĵo. »Ni kunlaboros kun la koncernaj dungitoj por helpi ilin trovi novajn dungojn en la kompanio aŭ serĉi ŝancojn ekster la kompanio.«

Createspace estis komence konata kiel firmao *BookSurge*, kiun Amazon aĉetis en 2005.

El la movado

Invito al Frankfurt (Oder)

Je deka fojo okazos la Ponta Festo

Jam la dekan fojon Ronald Schindler instalos informstandon pri Esperanto nome de *Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio* kaj *Esperanto-Ligo Berlin* okaze de la tradicia *Ponta Festo* de la urbo Frankfurt (Oder) je la 1-a de majo 2018. Do eta jubileo!

Frankfurt (Oder) estas urbo 100 kilometrojn oriente de Berlin ĉe la limo al Pollando.

La aranĝo okazos inter 11:00 kaj 18:00 horoj ĉefe en la regiono de la urboponto inter Frankfurt (Oder) kaj Słubice. En la proksimeco de la ponto (al norda direkto) ankaŭ instaliĝos la informstando rekonebla per Esperanto-flago.

Nia informstando memkompreneble bonege kaj konvinke denove demonstru, ke Esperanto ne nur funkcias, sed estas bona interkomprenilo inter la popoloj, do ankaŭ ponta lingvo. Pro tio ankaŭ estus bonega afero, ke Ronald ne estu la unusola esperantisto dum la festo.

Do bonvolu veni multamase pro nia komuna celo – la uzado de Esperanto kiel ponta lingvo dum ponta festo!

Pliaj informoj

Ronald Schindler

e-poŝto: RonaldSchindler@web.de
Telefono: +49 1514 1419673

Vagas fantomoj

Vagas fantomoj tra Esperantolando, la fantomoj de miliono da esperantistoj finintaj Duolingo-kurson.

Antaŭ nelonge mi legis, ke unu miliono da personoj finis la Esperanto-kurson de Duolingo. Vere grandega, impresa sukceso. Tiu miliono aliĝas al la centmilo, kiu jam ekde dek jaroj mistere atendas en interreto kaj volas plifortigi la Esperanto-movadon.

Mi tute ne dubas, ke tiu miliono ekzistas. Sed min la nombro ne interesas. Min interesas la efiko, kiun havas la homoj al la organizoj, kluboj, kulturo, movado.

UEA almenaŭ haltigis sian stagnadon kaj havas malgrandan kreskon de la nombro de membroj. Ĉu tio estas sekvo de la Duolingo-kursoj? Kiu scias.

Mi ofertas kelkajn librojn en epub-formato por senkosta elŝutado el Guglo. Ĉiu, kiu havas androidan smartfonon, havas guglo-konton kaj tial povas elŝuti la librojn. Mi havas superrigardon pri la elŝutoj kaj nun malkaŝos al vi la proksimumajn nombrojn.

En 2017 Guglo raportis al mi 65 elŝutojn, kaj en la unua kvaronjaro de 2018 estis 35, do por la tuta jaro estos eble 140. Tiuj estas nur la nombroj de Guglo. La elŝutoj el la

retejo *esperanto-sh.de* estas pli altaj, sed tiujn mi ne komputas.

Komparu tiujn nombrojn al la miliono da personoj, kiuj finis interretan kurson. Evidente *Malbona io estas en Danujo* (El: *Hamleto, reĝido de Danujo* de W. Shakespeare, traduko de L. L. Zamenhof).

Mi havas simplajn (eble tro simplajn) respondojn pri tio, kio estas *malbona*:

• Esperantistoj ne legas. Tion mi jam delonge asertas, sed homo, kiu finis kurson en interreto, devas havi kapablon de legado, ĉu ne?

• Plejparto de la lernantoj estas *lingvovagantoj*. Ili lernas en ĉiu monato unu lingvon, finas la kurson kaj transiras al sekva lingvo. Esperanto kiel movado kaj kulturo tute ne interesas ilin. Ili estas perditaj. Eĉ pli malbone: Ili pruvas la netaŭgecon de Esperanto kiel komprenilo, ĉar ili ne uzas la lingvon. Por nacia lingvo tio ne estas problemo, por Esperanto tamen jes.

• Esperanto ne havas *dompotencon* (Hausmacht) de ŝtato. Ĝi vivas per siaj kulturo kaj movado, ne per ŝtataj potenc-rimedoj, ekonomio, polico, armeo kaj tiel plu. Tial instruado pri kulturo kaj movado estas deviga, ĉar lernanto alikaze ne scias, kion li faru per la lingvo – se li entute volas …

• La personoj finis kurson, sed ne scipovas Esperanton. Tial ili ne aliĝas al asocioj, ne abonas revuojn, ne legas librojn. Ili venas ekzemple al tvitero kaj petas: *Mi*

estas komencanto. Helpu al mi kompreni la akuzativon. Bonvolu korekti min.

Norddeutscher Bote

Esperanto-Treffen in Schleswig-Holstein

Am 7. April 2018 trafen sich Esperantisten aus Schleswig-Holstein, Hamburg und Niedersachsen in Marne (Kreis Dithmarschen).

Das 2009 eröffnete Kultur- und Bürgerhaus (KBH) erhielt 2011 einen Preis für hervorragende Architektur. Die Teilnehmer des Treffens konnten hier in einer sehr modernen und angenehmen Atmosphäre arbeiten.

Nach einem kurzen Imbiss begann die Veranstaltung im mit einem Beamer ausgestatteten Großen Saal mit einem Vortrag von Klaus Friese, Autor über Übersetzer aus Hamburg, über sein Buch „Fahrtrichtung Esperanto“. Albert Bielenberg berichtete im Anschluss von seinen Erlebnissen bei den Esperantokongressen in China und Japan.

Daniel und Åsa zeigten ihren Zeichentrickfilm „Mi soifas!“. Dieser war ihr Beitrag zum Filmwettbewerb „Teo kaj Amo“ (Tee und Liebe) von Radio China International (Ĉina Radio Internacia), der als Siegertitel in der Kategorie „Bester Zeichentrickfilm“ ausgezeichnet wurde. Es zeigt, dass sich Norddeutschland zu einem Schwerpunkt des kulturellen und literarischen Schaffens der Esperanto-Bewegung entwickelt hat.

Im Anschluss folgte bei Kaffee und Kuchen im kleinen Saal eine zwanglose Diskussion in Esperanto und auch in deutscher Sprache. Für einige Teilnehmer bilden diese Zusammenkünfte die einzige Möglichkeit im Jahr, die internationale Sprache praktisch anzuwenden, und so überwog der Esperanto-Anteil beim Sprechen.

Den Schlusspunkt setzte bei sonnigem Frühlingswetter (eine der wichtigsten Zutaten zu einem erfolgreichen Esperanto-Treffen) eine Führung durch die Innenstadt. Marne ist ein ausgesprochen hübscher Ort mit über 5000 Einwohnern in fast schon greifbarer Nähe zur Elbe. Sie ist Zentrum des Kohl-Anbaus, des norddeutschen Karnevals und Sitz einer Brauerei. Die Neugierde der Esperantisten führte die Gruppe in die Maria-Magdalenen-Kirche, in der die zufällig anwesende Küsterin einen Überblick über die Geschichte des Gotteshauses gab.

Von Schwerin an die Côte d'Azur

Die Schweriner Volkszeitung brachte am 27. März 2018 einen Beitrag über die Teilnahme von André Christian Weber an einem europäischen Frühjahrstreffen in Frankreich unter dem Titel „Esperantisten: Eine Familie".

Link: https://www.svz.de/lokales/zeitung-fuer-die-landeshauptstadt/esperantisten-eine-familie-id19437141.html

Felietono

Forgesitaj libroj

Dum la renkontiĝo de esperantistoj el Ŝlesvig-Holstinio en aprilo 2018 iu hazarde menciis la tradukiston kaj aŭtoron *Richard Schulz* (1906-1997, germano), kiu estas konata je la esperantigo de sia nomo *Rikardo Ŝulco*. Li tradukis la romanon *Die verlorene Ehre der Katharina Blum* (La perdita honoro de iu Katarino Blum') de Heinrich Böll (1917-1985, germano). Jes, la esperantigita nomo havas apostrofon. Escepte de mi neniu el la ĉeestantoj konis la tradukon aperintan en 1978.

La libro raportas, kiel ĝis tiam bonreputacia virino pro sia amikeco al kriminto estiĝas viktimo de malestimanta, malhomeca raportado de neseriozaj gazetoj.

Sed tiu libro ne estas la unusola, kiu estas preskaŭ forgesita, kvankam la originalo estas mondfama kaj tradukita en multajn lingvojn.

Je la posta tago mi vidis en tvitero titolpaĝon de *Libro de Amo*. Tiun libron mi ne havas, sed alian: *ABZ de Amo* de Inge kaj Sten Hegeler, eldonitan en 1972 en Danlando.

La menciita libro de Böll aperis en kunlaboro de la okcident-germana eldonejo *Bleicher* kun la orient-germana *Edition Leipzig*. La orient-germana eldonejo publikigis *Nuda inter lupoj* (Nackt unter Wölfen) de Bruno Apitz (1900-1979, germano) en 1974 kaj en 1977 la tradukon de la *Trigroŝa romano* de Bertolt Brecht (1898-1956, germano). *Trigroŝa romano* estas teatraĵo kaj libro el 1928. La du lastajn librojn tradukis D-ro Karl Schulze (1910-1983, germano).

Nuda inter lupoj raportas pri (parte realaj) okazaĵoj fine de la Dua Mondmilito en la koncentrejo Buchenwald.

Malliberulo kaŝe enportas trijaran infanon en la barakaron. La malliberula estraro volas savi la vivon de la knabo.



La Trigroŝa Romano estas la unusola finverkita romano de Brecht. Ĝi prezentas la karieron de du negocistoj kaj – laŭ la kritikistoj – spegulas la kapitalisman ordon, kiu subigas ĉion kaj ĉiun por la maksimumigo de la profito.

Lingva noto

El *vikipedio*

Felietono estas literatura-publicista verko de gazeta-revua ĝenro. Ĝia specifikeco estas akra-kritika rilato pri alskribataj temoj, eventoj, personoj el la sfero de kulturo, do ĉefe arto, literaturo kaj scienco. Felietono estas apud la rubrikoj politiko, ekonomio, lokaj novaĵoj kaj sporto unu el la kvin klasikaj sekcioj de gazeto, kiuj kutime havas apartajn redakciojn. Enhavo, aspekto kaj graveco de felietono tre diversas en la ĵurnalistaj tradicioj de diversaj landoj.

En la germana lingvo *felietono* signifas la kulturan parton de gazeto. Ĝuste tiel mi uzas ĝin.

Leterkesto

Ĝi estas ankoraŭ malplena.

El la redakcio

Jen ĝi eliras, la unua (aŭ nula) numero de reta, elektronika revuo, kiun mi planas jam kelkajn jarojn. Ĝia unua nomo estis *La Nova Heroldo*, sed nun mi decidis aldoni germanlingvan rubrikon kaj alinomi ĝin.

Tio estas revuo por la esperantistoj en Ŝlesvig-Holstinio, Hamburgo, Mek-Pom-io (=Meklenburgo-Antaŭpomerio), Germanio kaj eĉ la tuta mondo. Estas esperantaĵo, nu do. Ĝi aperos kvaronjare, se mi havos sufiĉon da artikoloj. Se mankos al mi kontribuoj, tiam la gazeto eliros pli malofte.

Ĉiu povas kontribui (escepto ĉi-sube). Verku artikolojn pri temoj, kiuj interesas vin, pri viaj hobioj, okazaĵoj en via urbo aŭ regiono, pri la Esperanto-klubo, pri sociaj temoj. Nordgermana Heroldo ne estu pure Esperanta gazeto (da tiuj ni havas sufiĉan nombron).

Se vi volas faciligi la laboron por mi, tiam vi verku en markdaŭna markolingvo (Vidu la klarigojn per la ligiloj) aŭ skribu en simpla teksto.

Nordgermana Heroldo ne estas ... platformo por politika propagando, personaj atakoj kaj tiel plu. **MI** decidas, kio estas tia.

Vi povas sendi bildojn por la titolpaĝo: 1600x1700 pikseloj, nigra-blanka, prefere stridesegnaĵo de urbo aŭ alia loko.

Ligiloj

- http://t1p.de/ngh (aŭ en longa formo: http://nova-heroldo.bl.ee/lnh/index.php) (La retejo de Nordgermana Heroldo. Nepre legu la paĝon! Mi opinias, ke ĝi estas sufiĉe bela.)
- http://esperanto-sh.blogspot.de/2017/07/pri-markdauno-markdown_29.html (Pri markdaŭno)
- http://esperanto-sh.blogspot.de/2014/09/la-markolingvo-markdauno-markdown.html (Pri markdaŭno)

QR-kodaĵo de la retpaĝo: Skanu ĝin per via smartfono.

La lasta paĝo

En ĉi tiu numero mi prezentas al vi bildkarton de la Internacia Ekspozicio de Bruselo en 1898 kun surskribo en Volapük. Sendis ĝin al mi s-ro Ralf A. Multan dankon!

CARTE POSTALE
POSTKAART
(Côté réservé à l'adresse)
Zijde voor het adres
INCONNU
ONBEKEND
ST-NICOLAS
SINGAPORE
MAKASSAR
1898